

## VIRINOJ EN ESPERANTA KULTURO

Ekde la unua momento kiam **Lazaro Ludoviko Zamenhof** finpretigis la unuan lernolibron, virinoj staris ĉe la lulilo de la lingvo: la dota mono de lia novedzino **Klara Zamenhof** naskita **Silbernik** (1863 – 1924) helpis presi la lingvon. La filinoj subtenis la patron. La patrino aktivis en varsovia Esperantorondo **Konkordo**: kuracistino **Sofia Zamenhof** (1889-1942) ordigis la ampleksan bibliotekon de la patro. La plej juna filino **Lidia Zamenhof** (1904-1942) lernis la lingvon, kiun la patro inventis. Ekde ŝia 9a vivo jaro ŝi posedis la lingvon, kaj poste instruis ĝin, gvidis kursojn, ĉefe per Ĉe-metodo. El la pola literaturo ŝi tradukis el la verkoj de Boleslaw Prus kaj H. Sienkiewicz, ŝi kunlaboris je **Enciklopedio de Esperanto**. Kiel adepto de bahaa religio, ŝi tradukis ĉefajn verkojn de la bahaa religio

Ambaŭ filinoj de Lazaro Ludoviko Zamenhof, samkiel lia fratino Ida Zimmermann-Zamenhof pereis en la koncentrejo Treblinka. Kiel jaron de ilia morto ni notas la jaron 1942.

Kiam Esperanto fariĝis publika afero, virinoj ekuzis ĝin: ili verkis, kantis, teatris en Esperanto. Kaj tion ili faras kontinue 120 jarojn.

La prezento por la bezonoj de ILEI- konferenco en Ranzan limiĝos al virinoj en Esperanta literaturo.

La unua virino kiu konsiderinde kontribuis al Esperanta literaturo en la plej frua epoko de la Internacia Lingvo estis germanino **Marie Hankel** (1844-1929). Ŝi, konforme al la gusto de la epoko, estis elektita reĝino de Internaciaj Floraj Ludoj en 1909. La urbo de ŝia agado, Dresden, omaĝis al ŝi per Marie-Hanke-Strato. La Esperanta kulturo ŝuldas al Marie Hankel la fondon de la unua **Esperantista Verkista Asocio**.

En la alia parto de la planedo tero, en Japanio kaj Ĉinio, malproksime de la loko kie Esperanto naskiĝis, en la tridekaj jaroj, ekagis virino kiu lasis unikan spuron en la historio de Esperanto. Ŝia nomo estis **Hasegawa Teru**, ŝia plumnomo **Verda Majo** (1912-1947). Ŝi uzis Esperanton ne nur kiel hejman lingvon kun sia edzo ĉino **Liu Ren**, por ŝi Esperanto estis politika ilo en batalo kontraŭ japana imperiismo en Ĉinio. La fakto ke ŝia patrolando Japanio agredis la landon de ŝia edzo Ĉinion, kaj ke ŝi ne obeis al la japanaj leĝoj kaj ne divorcis sed metis sin je la flankoj de ĉinoj kaj eklaboris kiel anoncisto ĉe ĉina radio kiu klarigadis al la japanaj soldatoj ke ili estas agresantoj, donas al ŝia vivo dramecajn dimensiojn kiajn en eŭropa kulturo ni konas per antikvaj grekaj tragedioj. Ŝiaj verkoj **Vivantaj soldatoj** (1941), **Flustr el uragano** (1945), **En Ĉinio batalanta** (1945) estas kolektitaj en **Plena Verkaro de Verda Majo**. Ŝi mortis tre virine, en Ĉinio batalanta kaj senpenicilina, de sekvoj de abortiĝo. Ĉinio konsideris ŝin nacia heroo, Japanio unue kondamnis ŝin... sed en 2000 konsideris ŝin inter la 100 plej signifaj japanoj. Ŝia vivo donis materialon al TV- filmo **Hejmsopira Stelo**. Ŝin rolis japana aktorino Kurihara Komaki kaj

ŝian edzon ĉina aktoro Gao Fen. La preleganto Spomenka Štimec ankaŭ iom kontribuis al la diskonigo de agado de Verda Majo: por UK en Pekino en 1986 estis surscenigita ŝia monodramo pri Verda Majo **Virino kiu flustris en uragano**. La teatra verko havis tre modestan sukceson en plenumo de aktorino **Vida Jerman**, sed ĝia afiŝo sukcesis multe pli: pentristo Nenad Dogan per tiu afiŝo estis prezentita en pariza ekspozicio de UNESCO **100 plej belaj afiŝoj en elekto de UNESCO 1987**.

El la angla kulturo devenas la plej konata Esperanta verkistino **Marjorie Boulton**

(**1924**). Al Esperanto altiris ŝin, pedagogo laŭ profesio, en 1949 la poezia esprimivo de la lingvo. Kiel specialisto pri angla lingvo ŝi sciis taksu la eblojn de Esperanto. Ŝi estas unuavice nia poetino kion ŝi konfirmis jam per la unua poemaro **Kontralte** 1955. Sed ŝi faris gravan servon al Esperanto per ŝia verko pri Esperanto kaj Zamenhof **Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto**. Boulton verkis ĝin unue angle laŭ la mendo de eldonejo kaj poste adaptis ĝin al por Esperanta publiko. Boulton ŝatas kunlabori kun siaj viraj kolegoj-poetoj. Tio postlasis al ni valorajn poemarojn **Rimleterojn** kun **William Auld** kaj **Duel** kun **Poul Thorsen**. Ŝi verkis ankaŭ prozon: novelojn (**Okuloj 1967**) kaj teatraĵojn (**Virino ĉe landlimo**). La libro **Faktoj kaj fantazio**, redaktita de Marjorie Boulton, apartenas al niaj plej gravaj instruaj libroj.

Sentemo de **Clelia Conterno – Gugliamenti (1915 -1984)** riĉigis nian literaturon per poemaro **Eta vivo (1969)** kvankam komence ŝi aktivis kiel kunlaboranto de satira gazeto **La Pirato**. Kiam en la itala societo aperis la verko de ĵurnalistino Oriana Falacci, **Letero al nenaskita infano, Clelia Conterno** respondis per siaspeco itallingva letero al naskita infano, traktanta la temon de klopodoj patriniĝi **Unu tago post la alia** (Esperantigita de Roger Bernard) 1982.

La poezian sentemon de estonino **Hilda Dresen (1896-1981)**, latvino **Ludmila Jevsejeva (1913-1980)** ( kaj kontribuojn de slavaj poetinoj **Vesna Skaljier-Race (1911- 2000)**, **Lucija Borčić (1921 -** la prelegantino ilustras per iliaj versoj kaj konigas al ni signifajn kontribuojn de la nuntempaj prozistinoj **Anna Lowenstein, Sabira Shun (naskita Stahlberg)** kaj **Lena Karpunina**.

La prelego konstatas ke en **Leksikono de Esperantlingvaj verkistoj** eldonita en Kroatio en 2006, inter 901 prezentitaj biografioj el la 120-jaroj aĝa Esperanta literaturo, statistiko kalkulus ke apenaŭ 10% estas virinaj kaj la plej granda parto eŭropa. Sed virina rolo en Esperanta kulturo neniel estas minora: la virinoj rekonis la fajnan esprimivon de Esperanto kaj uzis kaj uzas ĝin elkore, plezure kaj fekunde.

Spomenka Štimec